Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Majo-Junio 2018 | n-ro 05-06 (1355-1356)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Esperantaj versoj en publika omaĝo al Vicente Aleixandre

Matene, la 29-an de aprilo, sur la madrida placo Plaza de Olavide okazis publika omaĝo al la karmemora hispana poeto Vicente Aleixandre, elstara membro de la t.n. Generacio de 1927, unu el la plej gravaj poetplejadoj en la historio de la hispana beletro, kaj Nobelpremiito pri literaturo en 1977. La omaĝo konsistis en deklamo far nuntempaj konataj poetoj kaj far genajbaroj de la kvartalo Chamberí de poemoj ĉu de Aleixandre, ĉu de aliaj samplejadanoj. La esperantlingva poezio estis tie reprezentita. La organizantoj proponis al mi deklami ambaŭlingve (hispane-esperante) tiuspecan poemon, kaj mi plej volonte akceptis. Du pliaj madridaj geesperantistoj, Águeda kaj Ricardo Biurrun, ĉeestis la aranĝon, kiun oni fine okazigis malgraŭ ĝena maloportuna pluvo. Ricardo kaj mi surpodiiĝis kaj deklamis poemon de Vicente Aleixandre. Ricardo, elstare, en la originala hispana, Ven siempre, ven; mi, en mia esperantigo, *Venu ĉiam, venu*. Kiel kutime, la publiko miris pri la beleco de Esperanto.

Jen ĉi-sube la poemo de Vicente Aleixandre *Venu ĉiam, venu*, en mia traduko:

Ne proksimiĝu. Via frunto, via arda frunto, via brulanta frunto,
la spur' de iuj kisoj,
tia brilego sensebla, eĉ en plena tago, se vi alproksimiĝas,
tia brilego kontaĝa, kiu restas mia-mane,
tia rivero luma, en kiun mi enmetas miajn brakojn,
el kiu mi preskaŭ ne kuraĝas trinki timante postan vivon, severan, de bril-astro.

Mi ne volas, ke vivu vi en mi kiel vivas la lumo,
en tia izoleco de stelo kuniĝanta kun sia propra lumo,
al kiu oni rifuzas la amon pere de la spaco
dura kaj blua, kapabla disigi, ne kunigi,
kie ĉiu bril-astro nealirebla
egalas solon, kiu, ĝema, sendas sian triston.

Solo scintilas en la mondo sen amo.
La vivo estas ŝelo viveca,
haŭto aspra kaj senmova,
kie homo ne povas sian ripozon trovi,
kiom ajn li aplikas sian sonĝon kontraŭ astron estingitan.

Sed vi ne proksimiĝu. Via scintila frunto, brulanta karbo, kiu forprenas mian propran konscion,
duelo fulmo-brila, kie subite mi sentas la tenton morti,
bruligi miajn lipojn per via tuŝet' neforviŝebla,
senti mian karnon fandiĝi kontraŭ vian bruligan diamanton.

Ne proksimiĝu, ĉar via kiso pluas kiel la neebla kolizio de la steloj,
kiel la spaco subite ekbrulanta,
eter' propaga, kie la detruo de la mondoj
estas la sola kor', kiu forbrulas.

Venu, venu, venu, kiel la obskura estingita karbo, kiu entenas morton;
venu kiel la blinda nokto, kiu al mi proksimigas la vizaĝon;
venu kiel lip-duo markita de la ruĝo,
de la longa linio fandanta la metalojn.

Venu, venu, mia amo; venu, hermeta frunto, rondaĵo preskaŭ ruliĝanta,
kiu brilas kiel orbito mortonta mia-brake;
venu kiel du okuloj aŭ du profundaj soloj,
du vokoj urĝaj kun profundo nekonata.

Venu, venu, morto, amo; venu tuj, vin mi detruas;
venu, ĉar mi volas mortigi aŭ ami aŭ morti aŭ doni al vi ĉion;
venu, ĉar vi ruliĝas kiel leĝera ŝtono,
konfuza kiel luno, kiu petas de mi miajn radiojn!

Sanon kaj poezion!

Miguel Fernández

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen majo-junia numero kun preskaŭ normala amplekso, kaj vere finpretigita en junio. Denove kun ofero de la interŝanĝoj kun la aŭtoroj, kaj kun malpli da provlegado, sed espereble tio estos la lasta fojo por ĉi-jare.

En tiu ĉi numero vi trovos la diversajn raportojn, kiuj estos diskutitaj aŭguste dum la SAT-kongreso en Kragujevac. Kiel vi vidos en paĝo 26, ĉi-foje kelkaj programeroj estu partopreneblaj rete por ne-ĉeestantoj. Tio estos tute nova eksperimento, kiu koncernos interalie la redaktadon de venonta numero de Sennaciulo.

Kiel dirite en la agadraporto, plurfoje sinsekve la presisto uzis malnovan version de la sendosliparo, anstataŭ precize indiki kie troviĝas la eraro en la senditaj postaj dosieroj. Tio koncernas preskaŭ tutan jarkolekton, ekde la numero 9-10 de la jaro 2017. Nun normale la erarofonto estas trovita kaj korektita ekde la nuna numero, kaj la PK havas ĉiujn bezonatajn informojn por organizi la resendon de pasintaj numeroj. Dankon al ĉiuj, kies reagoj helpis ekkonscii pri la problemo.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennaciulo 9-10/2018 (1355-1356) : 15a de aŭgusto

Sennaciulo 11-12/2018 (1357-1358) : 10a de oktobro

**Frontpaĝa bildo**

Aŭtoro: Luis Perea

## Enhavo


### Tra la mondo - Ameriko
4 La Doktrino Monroe

### Tra la mondo - Kurdio
4 Afrino
6 Intervjuo al Dilek Ocalan
7 Intervjuo al Haitham Hussein

### Tra la mondo - Eŭropo
9 Deklaro de Asizo
11 Kien vi iras, Latvio?
12 Letero al la prezidento de Francio

### Sindikatismo tutmonda
12 La sindikatoj de fervojkompanio luktas kontraŭ la privatigo

### Medio
13 Kiam pereos la homaro?
16 Poluata Ĉarento

### Beletro
2 Esperantaj versoj en publika omaĝo al Vicente Aleixandre
17 Recenzo
18 Sukceso de la traduka E-literaturo en internacia kongreso pri la hispana poeto Miguel Hernández
32 Nova dieco

### Intelekta memdefendo
21 En senfina mondo homo estas neglektinda grando. Ni ne bezonas dion.
23 Ludi kun belaj buntaj kubĉjoj (sed nur la furorĉjaj)

### Liberecana Frakcio
23 Nova numero de la liberecana revuo *Humanitat Nova*

### Tra Esperantio
24 Pri Maroko kaj aliaj islamaj landoj
25 Pri la 11-a Mezorienta Kunveno en Marakeŝo: Maroko estu nia venonta lando de Esperanto

### Nekrologo
29 Hans Jankowski (1930-2018)

### SAT-Kongreso 2018
26 Kongresinformoj

### El la SAT-administrejo
28 Financa raporto 2017
30 Perantoj | Kotizoj | Donacintoj | Informoj
31 Raporto de la Ĝenerala Konsilantaro 2017-2018



*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:* ***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***